Schweizer-Mustermesse (Svisa Specimena Foiro), en *Basel* (Svislando). — Unu foiro jare dum la dua duono de aprilo. — (k, r, p).

Skåne-Mässan (Foiro de Skanio), en *Malmö* (Svedl.), Kalendegatan 5. — (p).

Wiener Internationale Messe (Internacia Foiro de Wien), en *Wien II* (Aŭstrio), Aspernbrücke 2. — Unu foiro jare, dum septembro. — (k, r, p).

3. Komercaĵ Ĉambroj.

*Tiu listo estas fidinda. Ja mankas diversaj nomoj, sed ni ne enpresis ilin pro necerteco.

Post la urba nomo sekvas (inter "...") la titolo de la komerca ĉambro se eble en nacia lingvo. Ĉe la fino k signifas: korespondas en Esperanto; a = aprobis la Esperantan movadon.

Barcelona. — "Camara de Comercio". — (a).

Bath (Angl.). — "Chamber of Commerce". — (a).

Beauvais (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Beziers (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Bolbec (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Brive (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Budapest (Hung.). — "Komerca kaj Industria Ĉambro". — (a).

Burnley (Angl.). — "Chamber of Trade". — (a).

Calais (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Cluj-Koloszvar (Rum.). — "Komerca kaj Metia Ĉambro". — (k).

Dresden (Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Genève (Svisl.). — "Camera di Commercio Italiana per la Svizzera" (Itala K. Ĉ. por Svisl.). — (a).

Grenoble (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Hradec-Kralové (Ĉeĥosl.). — "Komerca Ĉambro". — (a).

Huesca (Hispan.). — "Camara Oficial de Comercio". — (k).

Königsberg (Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Krakow (Pol.). — "Komerca Ĉambro". — (a).

Lausanne (Svisl.). — "Chambre de Commerce Vaudoise". — (a).

Le Creusot (Francel.). — "Union Commerciale et Industrielle". — (a).

Leipzig (Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Limoges (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Lisboa (Port.). — "Camara do Comercio". — (a).

Locarno (Svisl.). — "Camera di Comercio". — (k).

London. — "Chamber of Commerce". — (k).

London. — "Chambre de Commerce française". — (a).

Los Angeles (Kal., U. Ŝ. A.). — "Chamber of Commerce". — (k).

Lyon (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Mâcon (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Milano (Italio). — "Chambre de Commerce Française". — (a).

Moulin (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

New York. — "Chamber of Commerce". — (a).

Nürnberg (Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Olmouc (Ĉeĥosl.). — "Komerca kaj Metia Ĉambro". — (a).

Paris. — "Chambre de Commerce", 8 Place de la Bourse. — (a).

Plymouth (Angl.). — "Chamber of Commerce". — (a).

Potsdam (Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Reichenberg (Ĉeĥosl.). — "Handels- und Gewerbekammer". — (k).

Rio-de-Janeiro. — "Associação do Comercio". — (a).

Saumur (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Schweidnitz (Saksio, Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Sofia (Bulg.). — "Komerca Ĉambro". — (a).

St. Omer (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (a).

Tarare (Francel.). — "Chambre de Commerce". — (k).

Temeszvar (Rum.). — "Komerca Ĉambro". — (a).

Tokio (Jap.). — Angle: "Chamber of Commerce". — (a).

Torino (Italio). — "Chambre de Commerce Française" (Franca komerca ĉambro). — (a).

Tréport (Francio). — "Chambre de Commerce". — (a).

Washington D. C. (U. Ŝ. A.). — "Chamber of Commerce". — (a).

Worms (Germ.). — "Handelskammer". — (a).

Yokohama (Jap.). — Angle: "Chamber of Commerce". — (a).

Association Industrielle, Commerciale et Agricole (Asocio Industria, Komerca kaj Agrikultura), en *Lyon* (Francel.), 10 rue de Maronniers. — (k).

Bureau International du Travail (International Labor Office — Internacia Labora Oficejo), en *Genève* (Svisl.). — (k, p).

de Información Comercial del Ministerio de Estado", en *Madrid* (Hispan.).

"*Cordoba Comercial*", en *Cordoba* (Hispan.).

"*Giornale del Commercio e dell'Industria della Svizzera Italiana*", en *Locarno* (Svisl.).

"*Ingenieur-Zeitung*", en *Cöthen-Anhalt* (Saksio, Germ.).

"*Közep Duna*" (Meza Danubo), en *Budapest V* (Hungario), Zoltan u. 10.

"*Le Cuir*" (La Ledo), en *Paris*, Rue de Bondy 54.

"*Les Echos*", en *Paris*, 4 rue Martel.

"*O Informador*", en *Evo-ra* (Portugallio), Rua de Republica 3-5.

"*Portugal*", en *Lisboa*, 44 Travessa de S. Marçal.

"*The Australasian Manufacturer*", semajna gazeto ilustrata, en

Sydney, N. S. W. Aŭstralio, Bond Street 16.

"*The Outfitter*", en *London E. C. 2*, Moor Lane 5 und 7.

5. Komercaĵ organizadoj de Esperanto.

Internacia Federacio por la Komuna Komerca Lingvo: en *Zürich 1* (Svisl.), Centra Poŝtfolio 6104.

"*Internacia Komerca Revuo*", centra organo por komerco, industrio kaj tekniko: en *Zürich 1* (Svisl.), Stampfenbachstr. 69.

AVIZO

ESTIMATA SINJORO,
via abono finiĝas kun tiu-ĉi numero. / Ni tre petas, ke vi TUJ renovigu ĝin, por ke ni povu REGULE sendi al vi la revuon. / Nian abonan tarifon vi trovas en ĉiu numero de nia gazeto.

SINCERE VIA

I * K * R

4. Faka gazetaro diverslanda.

Ni registris ĉiun fakan gazeton, revuon aŭ periodan eldonaĵon, kiu uzas Esperanton aŭ regule okupiĝas pri ĝia propagando.

"*Catalogo de Exportadores Espanoles*" (Adresaro de Hispanaj Ekspostistoj), eldonata de la "Centro

Argentino. "Comité para la Propagación del Esperanto en el Comercio" (Komitato por la propagando de Esperanto ĉe la komerco). Sekr.: S^{ro} Venancio Deulofeu, en *Buenos-Aires*, Lavalle 1826.

Aŭstralio "Common Commercial Language Committee" (Komitato por Komuna Komerca Lingvo). Sekr.: S^{ro} A. R. Cohen, en *Melbourne*, P. O. Box 731 Eliz. Str.

Aŭstrio. Gesellschaft für Welthandel und Welthilfssprache (Asocio por komerco kaj helplingvo tutmondaj). Sekr.: en *Wien V*, Margarethenstr. 120.

Belgio. "Comité Belge pour la Langue Commerciale Commune" (Belga Komitato por Komuna Komerca Lingvo). Sekr.: S^{ro} Ch. Pirnay-Demez, en *Verviers*, Chaussée d'Heussy.

Finnlando. "Kaupan Yhteiskielen Toimikunta Suomessa" (Finnlanda Komitato por Komerca Lingvo). Sekretariejo: en *Helsinki*, Kasarminkatu 20.

Franclando. Comité "Commerce et Industrie par l'Espéranto" (Komitato "Komerco kaj Industrio per Esperanto"). Sekr.: S^{ro} P. Flageul, en *Issy-Seine*, 9 Bd. Voltaire.

Germanio. "Komerista Grupo", en *Dresden*, Hauptstr. 38.

"Komerista Grupo", en *Freiburg i. B.*, Katharinenstr. 14.

"Komerista Grupo", en *Riesa* (Saksio).

Granda Britio. "Common Commercial Language Committee (Komitato por Komuna Komerca Lingvo). Sekr.: en *London W. C. 1*, Hart Street 17.

Hungario. "Hungara Propaganda Komitato por Lingvo Internacia". Sekr.: S^{ro} P. Balkanyj, en *Budapest VI*, Hajos u. 15/II.

Japanio. "Japana Komitato por Komuna Komerca Lingvo". Sekr.: S^{ro} T. Sasaki, en *Yokohama*, Minami-machi 1900.

Norda Ameriko. "Common Commercial Language Committee" (Komitato por komuna komerca lingvo). Sekr.: S^{ro} James F. Morton jr., en *New York*, 211 West 138th Street.

"The Esperanto-Service-Corporation", en *New York*, 500 Fifth Avenue.

Portugalo. "Portugala Komitato por la Propagando de Esperanto en Komerco". Provizora adreso: en *Lisboa*, Rua das Gaivotas 6.

Svedlando. "Förbundet för ett Internationellt Handelspråk" (Federacio por la Internacia Komerca Helplingvo). Sekr.: S^{ro} Leander Tell, en *Stockholm*, Prästgardsgatan 42.

Svislando. "Schweiz. Verband für die Welthandelssprache" (Svisa Asocio por Komerca Lingvo). Sekr.: en *Zürich 1*, Centra Poŝtfolio 6104.

Internacia Foira Konferenco.

"Finnlanda Foiro" en Helsinki sendis al ĉiuj foiroj de Eŭropo kaj al multaj komercaj ĉambroj tre interesan cirkuleron.

Okaze de la 14. Universala Kongreso de Esperanto en la ĉefurbo de Finnlando ĝi invitas al dua "Internacia Foira Konferenco".

Al dua? Certe jes, ĉar la unua konferenco estis en Praha, kie ĝentile

invitis nin la "Internacia Specimena Foiro de Praha". La kunveno ĉeĥoslovaka ne estis tre sukcesa, ĉar ĝi estis tute ne preparita: la afablan inviton de la "Foiro de Praha" ni ja ricevis nur en Praha mem, dum la kongreso. Tamen, la konferenco alportis multajn tre valorajn ideojn kaj eĉ kontentigan rezulton: inter la foiroj de Praha kaj Padova nun ekzistas

kontrakto pri komuna agado; la oficiala lingvo inter ambaŭ foiroj estas Esperanto (v. I. K. R. dec. 1921).

Nun "Finnlanda Foiro", sub larĝvida direktado de S^{ro} Laŭri Kuoppamäki, intencas daŭrigi la programon ekdiskutitan en Praha.

La invito al tiu nova konferenco eliris sufiĉe frue. Ĉiu interesato havas do sufiĉan tempon por prepari la temojn diskutotajn en Helsinki. Sed aktiva agado estas necesa, por rikolti freŝan frukton. Ne sufiĉas la "invito"!

Jam la foiroj en Basel, Breslau, Frankfurt, Fredericia, Leipzig, Malmoe, Paris, Reichenberg kaj Utrecht favore respondis al la invito; ankaŭ la franca komerca ĉambro en Tarare. Sed tio ne sufiĉas! Kie estas Barcelona, Bordeaux, Bruxelles, Bratislava, Lisboa, Lyon, Wien? Kaj kie estas la multaj komercaj ĉambroj, kiuj favoras aŭ eĉ

praktike utiligas Esperanton? Ĉu la Esperantistoj, kunlaborantoj tie, ne agos?!

Jam hodiaŭ ni povas diri, ke el neŭtrala lando venos oficialaj proponoj tre gravaj, pri kiuj parolos la tutmonda gazetaro. Niaj amikoj do ne hezitu: ili faru ĉion eblan por sukcesigi la iniciaton de Helsinki, ĉar de multnombra partopreno dependas grava sukceso!

*

"Finnlanda Foiro" decidis, agi en plena konsento kun "Internacia Komerca Revuo". Tion ni sciigas al nia legantaro kun plena ĝojo, ĉar ni vidas el tiu fakto, ke "Finnlanda Foiro" komprenis la plej urĝan postulon de nia nuna movado: solidareco. Ni esperas, ke ankaŭ la Esperantistaro sekvos tiun devizon! Tiam ni venkos!

Grava propono rilate al foiroj.

La progresema direktoro de la "Finnlanda Foiro", S^{ro} Lauri Kuoppamäki, faras tre aprobindan kaj praktikan proponon, kiun li — por doni modelon — mem efektivigas.

Ne sufiĉe povante laŭdi tiun iniciaton, ni ĝin konigas al la tutmonda Esperantistaro kaj esperas, ke ĝi trovos ĉie imiton:

"Ĉar ĝisplue troviĝos foiroj, kiuj ne povos elspezi por speciala foira katalogo Esperanta, estus dezirinde, ke almenaŭ al la listo de komercaĵoj estu aldonita Esperanta traduko, por ke — per tio — tuj troviĝu la aĉeto-

lokoj en koncerna foiro. En tiu senco mi kuraĝas proponi aranĝon en la nuna katalogo de Finnlanda Foiro.

La katalogo de Finnlanda Foiro povos, ĝisplue, esti presita nur en lingvoj finna kaj sveda. Tamen al la titolo de ĉiu vargrupo ni aldonas ankaŭ Esperantan tradukon. Plue, ĉiu vargrupo posedas sian propran numeron; tiu numero troviĝas en la alfabeto ordigita listo de komercaĵoj. Tio ne pliigis la jam 200-paĝan katalogon per pli ol ĉirkaŭ 10 paĝoj, kio grandigas la elspezojn nur per ĉirkaŭ 5%."

"Suchard"

Skribu kaj — ne forgesu!

estas la nomo de la *sola* svisa ĉokolado, kiun la Esperantisto preferas... Skribu poŝtkarton al "Ĉokolado Suchard", en *Serrières* (Svis.) kaj postulu Esperantan prospekton!

Tamen, unu proponon ni devas aldoni. Ni, Esperantistoj, petas, ke per la naciaj idiomoj (uzataj en la katalogo) oni atentigu pri la fakto, ke tiu nova lingvo estas "Esperanto",

la lingvo internacia kaj helpa. Tion ni devas — kvazaŭ — postuli, ĉar se la foiroj propagandas nian lingvon, ili mem ja profitos de tio . . .

Ligo de Nacioj.

Komerca enketo.

La ĝenerala subsekretario de la Ligo, S^{ro} D^{ro} Nitobé, petis nian redaktiston, partopreni en la internacia enketo pri Esperanto, nun farata de la Ligo.

Por tiu celo ni preparis specialan 'Komercean Demandaron', kiu rilatas nur al fakaj aferoj. Ĉefa tasko de tiu enketo estas: kolekti *dokumentojn* (ekz. katalogojn, originalajn raportojn

de komercaj ĉambroj) kaj informojn tute *akuratajn*. Ni ja ne bezonas simplajn novaĵojn (kiujn ni facile povus ĉerpi el la kutimaj 'kronikoj' de la Esperanta gazetararo), sed ankaŭ *pruvajojn!*

Kiu deziras helpi, bonvolu skribi al la redaktejo de I. K. R., por ricevi la 'komercan demandaron' kun 'labora programo'. U.

Komerca Demandaro.

[Enketo por la 'Ligo de Nacioj']

1. Donu la akuratajn adresojn de *firmoj* en via lando aŭ regiono, kiuj uzas Esperanton. [Konsilo: legu nian 'Komercean Adresaron' kaj simple kompletigu aŭ korektu ĝin].

Diru al ni, ĉu tiuj firmoj: a) korespondas en Esperanto; b) faras anoncan reklamon (pagatan!) en Esperantaj gazetoj; c) eldonis prospekton aŭ broŝuron en Esperanto (se eble, aldonu almenaŭ 1 ekz.).

2. Donu la nomojn (naciolingve) de *Komercaj Ĉambroj* en via lando aŭ regiono, kiuj simpatias kun Esperanto aŭ iel agas por la lingvo. [Konsilo: legu nian 'Komercean Adresaron' kaj kompletigu aŭ korektu ĝin].

3. Donu al ni liston de gravaj *societoj, institucioj* kaj de *eminentuloj*, kiuj jam publike subtenis aŭ favoris Esperanton. [Noto: nature tio rilatas nur al fakaj organizaĵoj kaj al eminentuloj, kiuj iel staras en la ekonomia vivo. — Konsilo: havigu al vi gazetartikolojn pri tio kaj sendu ilin al ni; pri rezolucioj k. t. p. sendu al ni

plenan tekston en nacia lingvo kaj Esperanto; ĉe eminentuloj notu ĉiujn titolojn, rangojn kaj oficojn, kaj sendu al ni ties 'opiniojn' ie publikigitajn].

4. Donu rimarkindajn ekzemplojn pri la *praktika utiligo* de Esperanto en via lando aŭ regiono. [Noto: nur pri komerco, industrio, tekniko, turismo; pri la foiroj ne parolu, ĉar ni jam faris rektan enketon].

5. Donu liston de *fakaj gazetoj*, kiuj regule publikigas notojn pri Esperanto aŭ kiuj praktike uzas la lingvon kaj enpresas Esperantajn tekstojn. [Konsilo: sendu al ni po 1 ekz. de ĉiu gazeto, elektante numeron kun grava enhavo, ekz. redakcia deklaro pri malfermo de rubriko k. a. — Se 'Esperanta Angulo' ne plu aperas, bonvolu noti tion, ĉar ankaŭ ĉesigitaj rubrikoj interesas, se la gazetoj estas gravaj kaj intertempe ne malsimpatiiĝis al Esperanto!].

6. En kiuj *fakaj lernejoj* kaj institucioj Esperanto estas instruata en via lando aŭ regiono?

- a) komercaj lernejoj;
- b) teknikaj lernejoj;
- c) devige?
- d) ne-devige?
- e) lernejo ŝtata?
- f) lernejo ŝtate subvenciata?
- g) lernejo privata?
- h) ĉu Esperanto estas daŭre en la programo aŭ nur por certa periodo?

[Konsilo: rilate al punkto h ni petas, ke vi letere demandu la lernejestron pri la rezulto de la lasta jaro, t. e. pri la nombro de la klasoj, lernantoj, instruistoj kaj pri la estonta instruado. Bonvolu sendi al ni la originalan respondon!].

Al tiu demando 6 ni ne petas respondon el landoj, kie la naciaj organizaĵoj jam enketis pri 'Esperanto ĉe Lernejo'.

7. Ĉu oficialaj *aŭtoritatoj* subtenas aŭ subvencias Esperanton en faka sfero? Donu detalojn kaj sendu gazetraportojn!

3 principoj:

Raportu nur pri faktoj ĉiam kontroleblaj!

Evi tu paroli pri malgravaĵoj; parolu plej akurate!

Aldonu al via raporto ĉiujn eblajn *dokumentojn*, por ke la Ligo de Nacioj tuj ekkonu la seriozecon de via raporto!

2 konsiloj:

Ne pensu: nu, morgaŭ mi volas eklabori . . . Sed: komencu *jam*

Brazila Nacia Ekspozicio.

"Esperanto Triumfonta" publikigis la sekvantan raporton:

U.— En svisa ĵurnalo aperis lastatempe noto pri la Brazila Nacia Ekspozicio. Je la fino staris tiu frazo: "La ekspozicio eldonis bele ilustritan prospekton ankaŭ en la internacia helpa lingvo 'Esperanto'; kiu deziras ĝin ricevi senpage, kune kun mallonga resumo germanlingva, skribu al la sekretario de la Svisa Asocio por Komercita Lingvo en Zürich . . .".

hodiaŭ, ĉar la afero urĝas kaj ĉar la laboro ne estas farebla en unu sola tago!

Sendu ĉion plej baldaŭ al *ni* (ne al la Ligo): 'Internacia Komercita Revuo', en Zürich 1 (Svisl.), Stampfenbachstr. 69.

1 admono:

Se vi ne havas la necesan tempon, serĉu kolegon, kiu transprenas tiun laboron — aŭ kiu kunlaborados kun vi!

Noto pri lingvoj:

Dokumentoj en lingvoj germana, franca, angla, itala aŭ hispana ne bezonas esti tradukataj, ĉar ni mem tion povos fari, se necese.

De dokumentoj en aliaj lingvoj oni bonvole traduku nur la plej gravajn frazojn!

Informu nin

per simpla poŝtkarto pri via akcepto aŭ ne-akcepto de kunlaborado. Tiel ni havos la eblecon, evitigi paralelan agadon en regionoj aŭ landoj, kie pluraj kunlaborantoj troviĝas!

Internacia
Komercita Revuo

Zürich 1 (Svisl.)
Stampfenbachstr. 69.

Svisa Foiro

(Basel).

Dum la "Svisa Specimena Foiro" en Basel, 22. Aprilo ĝis 2. Majo, okazas aparta "Esperanta Tago" kun propagandaj paroladoj en germana, franca kaj itala lingvoj.

La "jurnalistan tagon" de la foiro, kiun partoprenas pli ol 100 svisaj ĵurnalistoj, ĉeestas ankaŭ red. Unger. Dum la bankedo li alparolos la kolegojn en Esperanto.

Alia grava konferenco okazas pri

"repreno de svisaj komercaj rilatoj kun Ruslando". Ĉefan paroladon faras red. Unger, kaj li certe ne forgesos, citi nian lingvon.

En la nacia komitato de la "Svisa Specimena Foiro" estas i. a. S^{ro}i Carlo Gilà (Locarno) kaj D^{ro} Rudolf Lüdi, ambaŭ membroj de la "Svisa Asocio por Komercia Lingvo"; ankaŭ S^{ro} Eug. Faillettaz (Lausanne) apartenas al tiu komitato.

Prokraston

tre grandan havas tiu-ĉi numero.

Kiel oni vidas en nia ĉefartikolo, la kolektado kaj kontrolado de ampleksa adresa materialo estis tre pena laboro, kiu absorbis tutan nian tempon. Sed ni volis prezenti al nia legantaro adresaron vere fidindan!

Due, pro financaj kaŭzoj ni denove devis presigi la revuon en Germanio. Tiu ŝanĝo ankaŭ kaŭzis tempoperdon ne malgravan.

La vivo de nia revuo ne estas tre firma, ĉar ni ne havas la absolute necesan monan subtenon. Ni ripetas, ke per la abonprezo ni ne povas pagi la elspezojn por preso, ekspedo kaj administro de la gazeto! *Nur per bone pagataj anoncoj ni povos daŭre vivteni la revuon!* Tion bonvolu atenti la "Esperantaj firmoj" tra la tuta mondo. Demandu nin: plezure ni faros al vi proponon!

Abono al I. K. R.

Kiom mi devas pagi?

Nova tarifo!

La jara abono al 'Internacia Komercia Revuo' kostas Fr. 7.— en svisa mono.

Por ĉiuj landoj kun 'suferanta mono' ni faras esceptan prezon tute favoran: *oni kalkulu la 20-oblan sumon de la afrankaĵo por ordinara letero al eksterlando.*

Ekzemplo: en Germanio, letero al eksterlando kostas M. 4.—; la abono tutjara al I. K. R. kostas do 20 × 4.— = M. 80.—.

Ni akceptas pagon en bankbiletoj de ĉiu ŝtato, sed ĉi abonanto estas

petata, pagi en la mono de sia propra lando, ne de alia!

* * *

La sendaĵojn akurate adresu al: 'Internacia Komercia Revuo', en Zürich 1 (Svisl.), Stampfenbachstr. 69. — Skribu ĉiam la plenan adreson, por plifaciligi la laboron de la poŝtistoj!

* * *

Abono al I. K. R. por duona jaro kostas la duonon de la tutjara abonprezo. — Abonojn por kvarona jaro ni ne akceptas!

Leterkeŝto

Al Foiro en . . . : Regule vi sendas al ni viajn informojn; kelkfoje ni ilin represis. Nun ni faris al vi anoncan ofertan kaj vi rifuzis. Vi argumentas, ke niaj prezoj estas "tro altaj" kaj ke en "aliaj Esperantaj gazetoj" vi ricevus tutpaĝan anoncon "por kelkaj frankoj", dum ni postulas Fr. 100.—.

Kion vi diras pri la Esperanta gazetaro ĝenerale, eble estas trafa. Sed nia revuo estas faka gazeto, kiu vivas sub tute aliaj kondiĉoj. Ni ne povas fordonaci niajn paĝojn! Ni estas komercistoj kaj tre bone scias, ke ĉiu servo postulas reciprokan servon. Se ni propagandas por via foiro en la teksta parto de nia revuo, tiam ni juste povas postuli, ke vi ankaŭ reklamu en la anonca parto. La prezo? Nu: laŭ la anonca tarifo oni kutime juĝas pri la seriozeco de gazeto. Por 10 frankoj vi certe ne povas postuli la saman sukceson kiel por 100 frankoj! Ĉiam vi devas pensi, ke nia faka gazeto

estas legata de fakistoj, t. e. de tiuj personoj, kun kiuj vi ja deziras havi rilatojn. Tute ne ni insistas. Tamen ni konsilas al vi: petu informojn de la "Svisa Specimena Foiro" en Basel (legu la anoncon en tiu-ĉi numero) pri la sukceso de la anoncoj en nia, revuo verŝajne vi tiam ne plu hezitos, doni al ni grandan mendon! Ĉio ja dependas de la sukceso

Al alia foiro: Tre volonte vi donus al ni anoncon, sed pri tio zorgas via agentejo en nia lando, kiu decidas mem pri la oportuneco de la reklamo. Tre bone. Sed se vere "tre volonte" vi donus al ni anoncojn — ĉu vi ne povus skribi al via svisa agentejo, ke ĝi donu al ni tiujn anoncojn? De platona amo kaj de belaj paroloj nia revuo ne povas vivi

Propagandistoj,

kiuj estas pretaj, aperigi en ĉiutaga aŭ faka gazetaro teknikajn notojn kun propaganda tendenco por Esperanto, estas petataj, skribi tuj al "Internacia Komercia Revuo", Zürich 1, Stampfenbachstr. 69.

T R E G R A V E !

La proksima numero de
"INTERNACIA KOMERCA REVUO"

aperos meze de julio en NOVA ELDONEJO.

S^{ro} Unger, transloĝinta al Genève, restas ĉefredaktisto. / La konstanta adreso de la eldonejo estas: ZÜRICH 1 (Svislando),

Stampfenbachstr. 69. / Abonojn k. t. p. oni

sendu ankaŭ al la adreso

en Zürich.

I · K · R

Schweizer Mustermesse Basel

Telegramm-Adresse: MUBA

Telephon Nr. 198 u. 200 / Postscheck- und Girokonto V 2810

....

BASEL, 15. Aprilo 1922.

Estimata sinjoro,

se vi havas intereson por la svisa menkato aŭ se vi deziras propagandi por la "Svisa Specimena Foiro", okazonta en Basel, bonvolu tuj postuli de ni senpage prospektojn en Esperanto.

Laŭ la nombro de la demandoj, kiujn ni ricevos en Esperanto, ni juĝos pri la praktika utilo de tiu lingvo.

Kun sincera saluto:

Svisa
Specimena Foiro.

KORESPONDO EN "ESPERANTO", LINGVO INTERNACIA

OVOMALTINE

bonega fortigaĵo, ŝata nutraĵo.

Se nutrado estas malfacila kaj se nenio plu estas digestebla, ekz. dum grava stomaka aŭ intesta malsano, dum nerva krizo aŭ dum malsanoj malfortigantaj, tiam Ovomaltine rapide akcelas la plifortiĝon kaj ofte ĝi pliigas la korpan pezon.

Ovomaltine nutras kaj plifortiĝas saniĝantojn, nervozulojn, homojn tro laborintajn aŭ nesufiĉe nutritajn; ĝenerale Ovomaltine mirinde efikas kontraŭ malforto ĉiuspeca.

Sana, vigla kaj rezistema vi restas, restas via edzino kaj via infano, uzante Ovomaltine ankaŭ dum la tagoj de saneco.

En Britio, ties kolonioj kaj dominioj, kaj en Norda Ameriko, "Ovomaltine" estas konata sub la nomo "Ovaltine", ĝi estas havebla en ĉiu apoteko, drogejo kaj bona nutraĵa vendejo. Ni atentigas pri la listo de niaj agentoj, en numeroj 19/20 de I. K. R.

Plezure kaj senpage ni sendos al vi nian Esperantan broŝuron, se vi skribas al ni!



D^o A. Wander S. A.

fondita en 1865

Bern

(Svislando).

Societo por Kemia Industrio
en
Basel (Svisio)

Fondita 1864 / Kapitalo: Fr. 20 000 000.—



Farboj kaj kemiaĵoj por tinkturado
presado, blankigo kaj tanado.

Indigo.

Kemie-farmaciaj produktaĵoj.

Specialaj preparaĵoj:
marko "Ciba".

Fotografaj produktaĵoj:
platoj, rivelaj substancoj kaj
solvaĵoj.

Oficistoj de nia firmo lernis
Esperanton, por povi respondi al Esper-
antaj leteroj! / Demandojn ni atendas
nur de seriozaj importistoj!



LEIPZIG-A FOIRO
La ĝenerala internacia Foiro
de Germanujo

La unua kaj plej granda Foiro de la mondo.
Same grava por ekspozantoj kaj por aĉetantoj.

Ĝenerala Specimenfoiro kun Foiroj
por Tekniko kaj Konstrufako

Aŭtuna Foiro 1922 de la 27a de aŭgusto ĝis
2a de septembro:

Printempa Foiro 1923 de la 4a ĝis 10a de marto.



Informojn donas kaj aliĝojn akceptas la Foiroŝicejo
por la Specimenfoiroj en Leipzig:

MESSAMT FÜR DIE MUSTERMESSEN
IN LEIPZIG

2.374

ekspozantoj partoprenis en la aŭtuna foiro
1921 en Praha.

22.248 m²

da areo ili okupis kaj la vizitantaro el la
tuta mondo aĉetis por pli ol

1.040,451.950.— Kr. ĉ.

Tiuj ciferoj parolas pli frafe ol in ajn arti-
kolo pri la ekonomia vivo de Ĉeĥoslovakio.

Por komercisto valoras nek tradicioj
nek esperoj:

nur faktoj pruvas!

Ili diras al vi, ke la "Internacia Specimena
Foiro de Praha" estas

**tre grava,
tute internacia,
plene sukcesa!**

Tial postulu tuj informojn, prospektojn k. t. p. de

**INTERNACIA
SPECIMENA FOIRO
PRAHA**

Ĉeĥoslovakio ★ Poŝtfako 423

E S P E R A N T O U Z A T A !